# AGADRAPORTO DE ILEI

## 1950 - 1951.

La monda situacio sur la interpopola kamp dum la monatoj post niaj kunvenoj en Parizo 1950 kaj ĝis nun ne estis tia, ke ĝi progresigis tiujn movadojn, kies laboro dependas de paco kaj homa bonvolo kaj internacia kunlaboro.

Ni devas konstati, ke la atmosfero ne estis bona por la esperantoorganizoj, kaj ni ne forgesu, ke la rezultoj. kiujn ni notis, devas esti rigardataj kiel fruktoj de idea agado kaj idealisma klopodo sub la stelo de kredo kaj espero.

Al Internacia Ligo de esperantistaj instruistoj apartenis jenaj membroj: Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer, Germanujo, Groupe des Espérantistes de l'Enseignement (GEE) Francujo, Nederlandse Groep van Onderweijzers, Nederlando, Society of British Esperantist Teachers (SBET) Svenska Lärares esperantoförening, Svedujo.

La Estraro de ILEI konsistis el f-ino Violet Nixon, Birmingham, Anglujo, prez., s-ro Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo, sekretario kaj kasisto kaj gvidanto de la Centra Informejo,, f-ino Jeanne Dedieu, Toulouse, Francujo, s-ro P. Korte, Veendam, Nederlando kaj s-ro K. Kröber, Kitzingen A.M. Germanujo.

Komitatano estis s-ro Joel Wilkki, Somero, Finnlando.

Oficiala organo estis LA JUNA VIVO, redaktoro s-ro P.Korte.

Reprezentantoj ILEI havis en jenaj landoj: Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉinujo, Finnlando, Hispanujo, ~~Indonezio~~, Irlando, Izraelo, Italujo, Kongo Belga, Maroko, Norvegujo, Nov-Zelando, Grekujo, Islando, Trieste, Urugvajo kaj Usono. Brazilo

ILEI estas kunlaboranta faka asocio de UEA pere de subskribita kontrakto.

Nia prezidantino f-ino Nixon, prilaboris la ricevitajn informojn pri taglernejoj. en kiuj Esperanto estas instruita dum la lerneja jaro 1950/51. Resume ni notas esperantoinstruadon en 16 landoj, en 60 popollernejoj, 51 komercaj liceoj, 15 seminarioj, 3 universitatoj kaj 5 aliaj lernejoj. Instruis 120 geinstruistoj. Partoprenis la instruadon 5.054 gelernantoj. Kompare kun 1947 ni registras pli bonajn ciferojn ĵus pasintan lernejjaron. ( 1947: - 16 landoj - 75 lernejoj - 63 geinstruistoj - 3.603 gelernantoj) Certe tiuj ciferoj estas tro malaltaj.

La celo de ILEI devas esti instigi la instruadon, inspiri la geinstruistojn aŭ mem aŭ alimaniere klopodi enkonduki esperanton en la lernejan mondon.

La reprezentantoj de ILEI estas niaj kontaktiloj en landoj, kie ne ekzistas instruista esperanta fakasocio. Al la reprezentantoj ni turnas nin por ricevi informojn pri la stato de esperanto en geinstruistaj

*La komitato konsistas el 6 membroj (reprezentantoj de la ligoj) el kiuj 5 apartenas al la estraro.*

rondoj. Se la reprezentanta sistemo donos deziritajn rezultojn, tio dependas de la intereso kaj raportemo de la reprezentantoj. Ni devas konstati, ke ne ĉiuj reprezentantoj atente faras sian simplan devon. Per ne deca silento kelkaj mallumigas sian landon, kiu pro tio fariĝas blanka makulo sur nia liga geografia karto.

Al tiuj. kiuj akurate plenumas sian reprezentantan taskon, ni esperimas koran dankon, esperante ke ilia bona ekzemplo venontĵare veku la respondecon de la silentemuloj.

Aŭstralio. Energia s-ro Chandler en Sidney multe laboras, eldonas gazeton. skribas artikolojn, instruas kaj kunlabore kun ne-esperantaj fakorganizoj aranĝis en septembro, pere de esperanto ricevitaj infandesegnaĵoj- ekspozicion. La estonteco ŝajnas favora.

Aŭstrujo. La instruista sekcio de Aŭstria Esperantista Federacio havas 24 membrojn. ILEI alte taksas la senĉesan laboron, kiu malgraŭ la konsiderindaj malfacilaĵoj estas farita kaj laŭpromese farota en Aŭstrujo. En 6 popollernejoj kaj 1 seminario oni instruis esperanton al 185 gelernantoj.

Belgujo. Almenaŭ 20 geinstruistoj kun esperanta intereso troviĝas en Belgujo. Persona propagando estas farata. Ne perdu la kuraĝon. Fondu geinstruistan sekcion de Belga Ligo.

Brazilo. En Campo Grande estas fondita kolegio, kiu havas la nomon "Kolegio Zamenhof". La standardo de la Kolegio estas verda flago. La lernejanoj portas blankan lernejan uniformon kun brodita verda stelo. S-ro La Scala, membro de la urba parlamento en Santos proponis pri oficiala kaj deviga kurso de esperanto en la Komerca Fakultato de Santos. En Kolegio Progresso tri profesoroj instruas esperanton. Granda intereso.

Britujo. Fine de decembro 1950 SBEI havis 218 membrojn. Paska lernejo por geinstruistoj okazis en Folkstone kun 26 partoprenantoj. En Ipswich bonega ekspozicio de lernejaj objektoj, akiritaj per esperanto. Bona ~~gazeto~~ kunligas la membrojn. Oni instruis esperanton al 1.528 gelernantoj en 22 lernejoj. Ni aplaŭdas tiun bonan rezulton.

Bulgarujo. En 1 popollernejo kun 12 anoj oni instruis esperanton

Finnlando: En la liceo de Somero deviga esperanto instruado en 3:a klaso (13-14 jaraj geknaboj) 2 lecionoj posemajne. S-ro Wilkki modele laboras, same s-ro Setälä. Entute 75 gelernantoj studis esperanton.

Francujo. Esperanto instruita en 29 lernejoj kun 442 gelernantoj. somerlernejo de GEE okazis tradicie kun 60 partoprenantoj. Gazetoj fakaj favoras. F-ino Dedieu meritas specialan dankon pro modela laboro.

Germanujo. En 22 lernejoj esperantoinstruado al 507 gelernantoj. Energia kaj rezultodona laboro de s-ro Kröbel. Internacia instruista seminario en Kochel kun enhavoriĉa programo.

Grekujo. En 21 lernejoj oni instruis esperanton al 1.603 gelernantoj. Tre bone, gekolegoj.

Hungarujo. Malfacilaĵoj malhelpis niajn energiajn hungarajn samideanojn, sed 25 gelernantoj studis esperanton.

Israelo. Ne multaj - sed almenaŭ 5 esperantistaj instruistoj en la lando.

Italujo. 80 gelernantoj studis esperanton.

Jugasluvujo. En 2 lernejoj 60 gelernantoj studis esperanton.

Maroko. Ekzistas ĉirkaŭ 7 esperantistaj instruistoj. S-ro Ohana ek de 1945 ĉiujare gvidas esp. kurson.

Nederlando. 278 geknaboj en 11 lernejoj studis esperanton. La intereso pri esperanto inter la aŭtoritatuloj kreskanta. 70 geinstruistoj apartenas al la instruista esp. organizo. Bonaj rilatoj kun pedagogiaj asocioj.

Norvegujo. Grava instrua institucio aranĝis senpagan esperanto-instruadon por studentoj. Esperantofako en Oslo, Bergen kaj Trondheim. Artikoloj aperas de tempo al tempo en la instruista fakgazetaro. 1 kurso kun 12 blindaj gelernantoj okazis.

Polujo. 1 universitata kurso kun 39 partoprenantoj okazis.

Svedujo. Al la sveda instruista sekcio de SEF apartenas 250 anoj, kiuj ,aliĝante al la landa Federacio aŭtomate fariĝas membroj de ILEI. Propagando inter la seminarianoj. Laŭraporte 80 geknaboj studis esperanton.

La ĉi supre menciitaj elĉerpaĵoj el la raportoj de niaj reprezentantoj certe ne kovras la tutan veron. La nombro de esperantistaj instruistoj kaj esperanton studintaj gelernantoj certe estas pli granda ol registrite.

Por havi la necesan fundamenton por veki la intereson de la aŭtoritatoj kaj pedagogiaj instancoj estas absolute nevese havi pli ampleksan informan servon. La antaŭenmarŝo de ILEI estas dependanta de ĉies nia volo kunagi.

La estraro scias, ke ILEI nun estas funkcikapabla. Iom ni progresis, sed tio ne kontentigas nin.

La lernejo estas la efika ilo, kiu en si portas la venkon de esperanto. Ni uzu la instrumenton - ĉiu laŭ siaj kapablo kaj forto - kaj ni certe vidos la rezulton.

Violet C. Nixon
prezidantino

/Einar Dahl
Sekretario

866

866